2-a Jaro, N-o 12 (64)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

17. Decembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Korespond-adreso: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstr. 1, Leipzig-Stö. (Germ.)

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Balkana murdado*)

Balkana duoninsulo areas ĉirkaŭ 800 000 km^2 en kiu loĝantoj 38 420 000 diversnaciaj loĝantoj. Ĝi estas dividita inter 5 landetoj, nome:

Rumanio okupas ĉirkaŭ 305 000 km^2
kun 16 200 000 loĝantoj

Jugoslavio okupas ĉirkaŭ 248 000 km^2
kun 12 030 000 loĝantoj

Bulgario okupas ĉirkaŭ 96 000 km^2
kun 4 860 000 loĝantoj

Grekio okupas ĉirkaŭ 122 000 km^2
kun 4 480 000 loĝantoj

Albanio okupas ĉirkaŭ 28 000 km^2
kun 850 000 loĝantoj

Tiel dividitaj supre nomitaj landoj enhavas sufiĉe grandan nombron da diversaj alinacianoj, kio kaŭzas eternajn malpacon kaj konflikton.

Ĵus meze de balkana duoninsulo lokiĝas iu parto de la tero, iu fokuso vulkana, kiu pretendas ekfajrigi novan militon, novan sangan interpuŝiĝon. Ĝin oni nomas "Makedonio". Sed akcentu ni tuj, ke Makedonio estas nacia konglomerato, do samtempe iu problemo solvenda. Historio notas, ke Makedonio estas patrujo de antikva, fama militestro kaj reĝo Aleksandro Makedona. Balkanano, ne makedono, ĉu laborulo aŭ burĝulo estis aŭdanta paroli pri Makedonio jam dum sia infaneco, en unua popollerneja klaso, ke ĝi estas "neliberigita parto de la patrujo". Tion predikis kaj predikos samtempe instruisto kaj profesoro en Beogrado, Ateno, Sofio kaj Terano; Kiu estas prava? Ĉiuj volas fariĝi rabistoj! Inteligentularo kaj ĉiuspeca burĝaro ensuĉinte tiun "sanktaĵon", ne estas povanta esti alia — krom esponanto de tia ideologio. Jugoslava burĝaro do diras: jugoslavaj vilaĝoj etendiĝas ĝis Saloniko; bulgara burĝaro diras: la tutan makedonian parton, kiun posedas Jugoslavio, loĝas veraj bulgaroj; grekoj kaj albanoj pretendas reciproke la samon. Ĉe ĉi-stato oni vidas, ke "Makedonia problemo" ne estas ankoraŭ solvita kaj, ke ne estas solvenda ĝis sur Balkano ne aperos Balkana Socialista Federacio! Dume, ĉi-stato de nesolvita problemo timigas balkanan laboristaron kaj kamparularon, por ree ne esti alkondukita al la homa buĉejo. Kontraŭe, burĝaro revas, predikas kaj orgias pro liberigo siajn fratojn translimajn . . . Tio estas unu el la multaj cirkonstancoj, kiuj subpremas kaj timigas la laborularon de la Balkano. Tio estas ŝtonego sur ĝia brusto . . . Precipe makedonoj estas tiuj kiuj plejmulte suferegas kaj en unu vorto estas murdigitaj. Ĉiuj ŝtatetoj loĝantaj Balkanon: Bulgario, Jugoslavio, Grekio, Albanio post la renverso de turka regado sur Balkano tuj alkorpigis al si iun parton de Makedonio. Sed tial, ke Makedonio estas nacia konglomerato kaj balkanaj ŝtatetoj disdividinte Makedonion starigis en la sama momento inter si la ŝtonon de la malpaco kaj kaŝan aŭ malkaŝan malharmonion. Ŝtatetoj alkorpiĝintaj malpli da Makedonio avide kaj ĵaluze montras sian malamikaĵon. Je celo malutili unu al la alia, ili subtenas diversajn supernaciistajn organizaĵojn, taĉmentoj kaj bandoj eniĝantaj reciproke translimojn kaj kaŭzas al la loĝantaro de Makedonio ĉiujn eblajn teruraĵojn kaj perfortojn. Ofte okazas, ke multaj vilaĝoj estas tute detruitaj de la fajro kaj vilaĝanoj murdigitaj. (Notinde estas, ke la suprajn organizaĵojn kaj bandojn burĝaj reĝimoj estis uzantaj kontraŭ laboristaro kaj kamparularo. Burĝaj politikuloj povas nur al ili danki, ke, laborist-kamparularaj revolucioj malsukcesis sur Balkano). — Do, ni konkludu, ke nomitaj ŝtatetoj balkanaj jam de sia aperigo kiel liberaj ŝtatoj ludas per ĉi-iloj uverturon de la armita koncerto — uverturon de pli-malpli proksime de unu neevitebla nova milito. Pro Makedonio jam koncernaj ŝtatetoj, du jaroj antaŭ la mondmilito kontraŭmilitis inter si. Kiel oni vidas el ĉi bildo, balkana fokuso — Makedonio — estas tia sektoro sur eŭropa kontinento, kiu atribuas al si unu novan sang-homan interpuŝiĝon. —

Por havigi al si iun bildon, kiom la loĝantaro de Balkano kaj precipe tiu de Makedonio estis suferanta, alpaŝu ni iom en la historion kaj lasu ni ĉi-politiknacian momenton. — La krucumiĝo de la loĝantaro balkana grandskale komenciĝis depost turka invado kaj almilito sur Balkano el Azio, kie ĝia potenco firmiĝis kaj longdaŭris ĝis kelkaj jaroj antaŭ la mondmilito. Turka regado kaj reĝimo estis la plej terura jugo kaj perforto por la balkana loĝantaro. Ĉi-jugo des pli estis netolerebla, ĉar la turka invado estis gvidata sub la religia egido. Turkaj militestroj (veziroj kaj reĝimularo) estis absolutaj mastroj ne nur de la havaĵo, sed de viroj, de la tuta familio. Kio por turka reĝimularo estis balkanano jen montru slava idiomo (vorto): "raja" sinonimo al vorto sklavo. Ĝi efektive estis tia. Ĝia kondiĉo de la vivo egalas al tiu sklavo el la antikva Romo. Ni povas kompari ĝin ankaŭ al sklavo "en la reĝimo de la koloniaj aferoj", kiam eŭropanoj vigle ko-

*) Ĉi-artikolo estas verkita jus 2 tagojn antaŭ ol okazis nuna grek-bulgara milit-interpuŝiĝo. Kiel oni vidas, la verkanto de ĉi-artikolo avertis kaj konjektis ĉi-malamikaĵojn.

mercadis kun indiĝenoj kiel per komerca varo. Kiel balkana viro estis tiu amase elverŝiĝinta la sangon sur la batalejo, tiel balkanaj virinoj estis amase en turkaj haremoj. Historio prave diros pri Balkano: lando de larmoj, malĉastiĝoj, murdadoj kaj sango. — Novaj ŝtatetoj de la XXa jarcento, ĝiaj reĝimoj kaj kulturoj surmetis aliforme katenojn al la balkana popolo ... Do, la kondiĉoj de la balkanano — de la laborularo — esence ne ŝanĝiĝis. Malaperiĝintan mezepokan turkan reĝimularon anstataŭis naciaj politikuloj, inteligentuloj kaj kapitalburĝuloj. Do ripetiĝas la samaj elementoj, la sama sorto: ĉiama sangigo, murdado kaj rabado. Ĝi ŝanĝis iom la vizaĝon, sed malbeno restis en sia daŭra valoro.

Je la fino ni demandu, kiam malaperos ĉi-malbenita sorto, ĉi-fantomo de sur balkana laborularo? Ni firme kredu! tiam, kiam sur la horizonto de la sunleviĝo aperos balkana federacio socialista!

Adriatikuloj.

Ankoraŭ unu bulgara ribelanto kaptita

Antaŭ du semajnoj estis kaptita de burĝaj agentoj la fama ribelanto R. Kemenceĝiev. Li estas vilaĝano ankaŭ bona spirita gvidanto de vilaĝanoj. Li estis kaj estas ĝis sia aresto unu el la plej viglaj kaj fervoraj propagandistoj. Post jaro 1923 li estis taksita de burĝa registaro kiel tre danĝera homo por nuna reĝimo. Ĉar li semas revolucian semon inter kamparanoj, de tiam estas nelegala kaj vivas subtere. Longan tempon li vojaĝis kaj ne estis kaptebla. Malgraŭ, ke li estas nelegala denove li laboris kaj agitis inter kamparanoj por la proleta movado. Li estis unu el nelacigeblaj batalantoj por la liberigado de tutmonda proletaro. Trifoje li estis mortkondamnita de militjuĝo, ĉar oni ne povis kapti lin kaj li ne povis esti ekzekutata.

Plej poste li estis kaptita de burĝaj agentoj en sia naskiĝvilaĝo, kaj li estis venigita en urbon Plovdiv. Laŭ lastaj sciigoj el bulgaraj burĝaj gazetoj li estis arestita en policoficejo, kaj li estos baldaŭ ekzekutita en urbo Karlovo — per pendigado.

Tio estas la sorto de ĉiuj laboristoj kaj kamparanoj, kiuj estas malkontentaj pri nuna burĝa reĝimo kaj agitas kontraŭ ĝi. Laboristoj kaj kamparanoj, kiuj agitas por ia maldekstra ideo, estas persekutataj kiel malamiko de "Patrujo". Kie li estas kaptata, li devas esti mortpafita en sama loko, kiel hundo. Sed la burĝaro pensas, ke, kiam ĝi persekutas kaj pendigas ĉiujn pli viglajn batalantojn, oni sukcesos sufoki la proletan movadon. Sed male, ĝi iros kun grandaj paŝoj antaŭen. Jam venas la tempo, kiam laboristoj venkas. Vivu la tutmondaj batalantoj! Mane ĉe mane ni sukcesas venki la kapitalismon. *z*

Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando

Rezultaton de mallonga priparolado ni atingis, ke ni interkonsentis, viziti kelkajn diversajn fabrikojn. Mi mem kun aliaj kamaradoj iris en ledfarejon, kie ni estis kore salutataj de la uzinkonsilantaro kaj la laboristaro mem. Jen ree la malfacilaĵo de la interkompreno sufokis iomete la entuziasmon de nia akcepto. Mankis al ni la tradukanto, fine maljuna laboristo helpis per sia modesta scipovo de la germana lingvo. Feliĉe la inĝeniero komprenis nian lingvon kaj ni povis komenci la trairon de la laborejoj. Unue ni surpriziĝis pro la grandaj amasoj de feloj, kiuj garantias por duona jaro laboreblecon. La fabriko produktas ledon de diversa kvalito, precipe rimenledon. En speciala laboratorio ĉiam pluraj kemiistoj provis novajn tanmetodojn, kaj ni ankaŭ povis konstati, ke en ĉiuj partoj de la uzino oni daŭre pli novigis la produktilojn. La laboro mem estas sufiĉe streĉa, pro tio nur viroj faris la pezan produktadan laboron. Virinoj nur estis dungitaj por purigado de administracio-oficejoj kaj de la laborista komitato, ankaŭ por ordigi la manĝejojn. Estas la unuaj laborprocedoj malagrablaj pro la akvoriĉeco, tiam la lastaj sufokis nin per ilia grandega varmego. Ĉiukaze mi povas imagi pli agrablan laboron. La salajroj moviĝis en por la taganrogaj cirkonstancoj atentindaj sumoj: 3—6 rubloj, ĉiu laboristo gajnis potage. Sanecaj kaj higienaj postuladoj bone estis plenumitaj. En specialaj manĝejoj la laboristaro havas la eblecon ricevi bonan tagmanĝaĵon por malalta prezo. Ke oni ankaŭ posedis proprajn klubejojn, tio jam estis memkomprenebla. En ĉi tiu ni ankaŭ vidis bibliotekon kun pli ol 10000 libroj. En la nuna jaro la uzino havis gajnon pli ol du milionoj da rubloj, de kiu sumo oni destinis dek procentojn por plibonigo de la laborcirkonstancoj kaj por ebligi al parto de la laboristoj pasigi ilian libertempon en ripozdomoj. Laŭ niaj ricevitaj informoj ĉiujare proksimume 200 laboristoj ĝuas tian privilegian leĝon por laboruloj. En la fabrikoj mi ankaŭ trovis la famkonatan "Leninangulo", aranĝita pro honoro de Lenin.

Post kelkhora inspektado ni ree unuiĝis kun la aliaj kamaradoj por fari rondveturon tra la urbeto, kie multaj detruitaj domoj memoris je la furiozaj bataloj inter la blankuloj kaj ruĝuloj. Ĉe la marbordo ŝanceliĝis sur la ondoj multaj boatoj de la fiŝkaptistoj.

Dum la malfruaj posttagmezaj horoj ni renkontis kun la taganrogaj gelaboristoj en bonsukcesa mitingo, kie la proletaj amasoj entuziasme salutis nin. Ĉi tie mi ankaŭ konatiĝis kun k-do Abramoviĉ, kaj kelkajn minutojn ni pasigis en agrabla interparolado.

Precipe mi observis, ke la virinoj ĉi tie, kiel ankaŭ en la aliaj de ni vizititaj lokoj, multnombre partoprenis politikan movadon. Mi en tiu momento pensis, kiom bona tio estos en nia germana lando, se la virinoj komprenus, ke ili devas kunbatali sur ekonomia kaj politika kampo. Sed ŝajnis ankaŭ ĉi tie, ke la viroj mem ne pensas kiel plej ofte faras germanaj laboristoj dirante, ke la virino devas esti en domo, en la kuirejo, al la kuirpotoj.

La reveturo okazis per la vagonaro, ĉar la vespero jam malheligis ĉion. Alveninte en Rostov, ni uzis la malmultajn horojn enmiksi nin inter la gelaboristoj, kiuj ĉeestis en la apud la stacidomo situata popolĝardeno, ĝuante la belegajn vesperhorojn. Baldaŭ "vigla" interparolado parte ruse, parte germane, kaj ni eksciis, ke oni ĝojas pri la nuna stato de ilia libereco, precipe la ina parto esprimis sian kontentecon.

Ne forgesi mi volas, ke la tagon antaŭe la laboristoj de Rostov aranĝis koncertvesperon honore de nia ĉeesto. La prezentadoj ankaŭ entenis teatrajn kaj gimnastikajn ludojn, kaj sen iu troigo ni povis aldoni, ke ni estis tute kontentigitaj. La prezentaĵoj montris bonan povon kaj mi kredis, ke ofte oni faras tion en la kluboj dum la libera tempo, alie oni ne povis ebligi tiun perfektecon de la prezentita.

(Daŭrigota)

Konferenco de laboristaj abstinenculoj

La 21. kaj 22. nov. okazis delegitkonferenco de la germana laboristabstinencula asocio en la sindikata domo en Berlin. Tiu konferenco precipe devis pridiskuti organizajn kaj propagandajn aferojn. La malfortigo, kaŭzita de la inflacio en Germanio, nun estas nuligita. La movado ree kreskas kaj gajnas pli kaj pli da influo inter la proletaro. Oni decidis profundan instruon de la junaj anoj kaj pli aktivan propagandon inter la virinoj. La penoj por kreo de laboristabstinencula internacionalo estu daŭrigotaj.

En la kadro de la konferenco okazis publika kunveno. K-do Sollmann parolis kiel unua pri la favora efiko de la alkoholmalpermeso. La diferencojn inter la amerikaj kaj germanaj cirkonstancoj li esprimis per jena frazo: "En Ameriko devas ĉiu, kiu volas ĝui alkoholon, ĝin serĉi kun penego; en Germanio ankaŭ al tiu, kiu ne volas trinki, oni altrudas la alkoholon." Pluraj parolantoj traktis la temojn: neceso de kontraŭalkoholaj leĝoj, alkoholo kaj punrajto ktp. Precipe ili montris, ke alilandaj socialistoj jam delonge batalas en tiu direkto, kio nur estus en la intereso de la proletaro. La kunvenintaro ankaŭ akceptis kelkajn tiasencajn rezoluciojn. En la diskutado ankaŭ kuraĝis paroli reprezentanto de la alkoholmetio, kiun tre trafe reĝustigis la aliaj parolantoj.

Laboristabstinenculoj esperantistaj de la tuta mondo, helpu al kreo de la supre citita internacionalo! Ĉiu SAT-ano — abstinenculo estas petata, skribi pri tiu temo senpere al jena adreso: Deutscher Arbeiter-

Abstinenten-Bund, Engel-Ufer 29, *Berlin SO 16*, (Germanio). Skribu esperantlingve. Tiamaniere ankaŭ tiu asocio nepre ekkonos, ke tre faciligas la fondon de internacionalo nia Esperanto. Se ili ne havas spertajn esperantistojn inter si, do ili devas turni sin al ni. Sekve, ĉiu k-do apartenanta al tiu movado nepre atentu nian deziron, kaj ankaŭ nia movado havos novan aprobanton.

El Hispanio

La hispana proletaro estas sendube unu el la plej malfeliĉa en la mondo. Tiu malagrablaĵo ne estas nova, do, ĝi jam devenas de antaŭtempoj.

Kompreneble, nuntempe kun la diktatoreco de Primo de Ribera la reakcio kreskis eksterordinare kontraŭ la proletaro organizita. Ĝi ebligas al ni vivi sen proletaj organizaĵoj kaj senlibereco en la ĵurnalaro.

Ĉiuj hispanaj malliberejoj estas plenaj je klasbatalantaj laboristoj; nur en Barcelono pli ol du mil kamaradoj kuŝas en karcero. Sed ne finas ĉi tie niaj malfeliĉaĵoj. Nia burĝaro tre amikiĝis kun la diktatoro, kaj tia amikeco malebligas nin protesti pro nia mizerega vivo. Niaj salajroj ĉiam estas pli kaj pli malaltigitaj, kaj la ok-hora labortago, kiu kostis al ni tiom da sangaj luktadoj atingi ĝin, preskaŭ malaperis, en multaj laborejoj oni laboras naŭ aŭ dek horojn ĉiutage.

Se ni provas ribeli, tuj oni enkarcerigas ĉiujn organizantojn, nur pro tio multnombro da honestaj laboristoj kuŝas en malliberejoj; kelkaj el ili de antaŭ du aŭ tri jaroj.

Niaj malamikoj, la burĝaro kaj policanaro inventas senlace rabojn, ŝtelaĵojn kaj komplotojn kontraŭ la nuna registaro, ili ĉiam trovas tombojn, pafilojn kaj eĉ pafilegojn, ĉiam enmiksas niajn kamaradojn kiel aŭtorojn aŭ kulpulojn en siajn planojn. Sed tio nur estas kiel pravigo al nia sklaveco kaj enkarcerigo de niaj kamaradoj, kiuj tiele estas devigataj resti tie ĝis kiam okazos la tago procesi ilin, sed tio tre malfruiĝas, do ili certe scias, ke la proceso redonos la liberecon al la t. n. "kulpuloj", atendante tion, niaj kamaradoj restas en malliberejo ĝis ilia putriĝo aŭ morto.

En la hispanaj malliberejoj okazas aferoj tiel monstraj, ke ili nur povas esti komparataj kun ti-kiuj okazis dum la feŭdala epoko.

Antaŭ du jaroj tre honesta laboristo, kiu ne akceptis malaltigon en la salajro, estis enkarcerigita; lia kamaradino kaj gefiloj vivas en la plej granda mizero. Tiom suferis tiu kamarado dum tiu tempo, ke li okule malsaniĝis, kaj sen kuracisto sen kuraciloj, li tute blinduliĝis, kaj ankoraŭ restas en karcero.

Alia kamarado ankaŭ enkarcerigita de antaŭ du jaroj, tute virga je kulpeco, suferante pro sia enkarcerigo kvazaŭ li estus sovaĝa besto, estante paca laboristo, li malsaniĝis en la cerbo, tute freneziĝis.

Similajn okazaĵojn ni povus multajn rakonti, sed certe ni farus senfina jenan raporteton.

Nur mi petas al la tutmonda proletaro, rememoru al la proletoj el Hispanio, kiuj suferegas persekutadon tiel kriman, kaj kompatu al aliaj, kiuj ne estante enkarcerigitaj suferas diktaturon saturitan de tiom da sklaveco, kio devigas nin vivi en tiel mizerega stato.

Noto. Sur pasinta numero de Sennaciulo mi legis artikolon subskribitan de k-do 3959, kiu enhavas kvazaŭ alvokon al la hispanaj kamaradoj, konsilante al ni ne partopreni la marokan militon. Mi volas klarigi, ke ĝis nun neniu SAT-ano hispana partoprenis tian militaĉon, malgraŭ la plej multaj estas en la militserva aĝo.

Kvankam ni suferas teruregan sklavecon, ni scias plenumi niajn devojn.

2003 el Barcelona.

Polio ne estas blanka lando (?)

Dum la debato en la Sejm (parlamento) pri la karcera administrejo la juda deputato *Sommerstein* deklaris laŭ la esplormaterialo de la Sejm-komisiono i. a. jenon:

La plej multaj de la politika enkarcerigitoj estas retenitaj en la esplorkarcero sub la plej hontindaj cirkonstancoj. Estas konstatita, ke ili estas retenitaj de la neobjektiva juĝistaro tute senkulpaj. La estro de la politika policistaro en Lemberg turmentis la politikajn enkarcerigitojn per elektra forto. Okazis, ke oni venenigis enkarcerigitojn per striknino, ke oni perfortigis enkarcerigitajn knabinojn, vundigis virinojn proksime de la seksaj organoj. La justecministro Siĥlinski deklaris en sia respondo, ke la ekscesoj en la karceroj naskiĝis pro la agitado de la internacia ruĝa helpo, ĉar la "bolŝevistoj" alcelas, elkrii Polion kiel lando de la blanka teroro kaj ĝin kalumnii. Do ni nun scias, ke Polio ne estas blanka lando, sed tute demokrata, en kiu oni nur turmentas kaj enkarcerigas proletojn senkulpajn!

Komedio pri "Dawes"-karbo

Laŭ la belgaj tagĵurnaloj, la liverado de karbo el Germanio por ripar-pago, laŭ la plano de Dawes, estas haltigita de la belga registaro. Tiu registaro trovas, ke al ĝi estas neeble liberiĝi de tiu karbo, pro la helpo, kiun la germana registaro donas en vendado de germana karbo alilande kaj, precipe, en Belgio.

Belgoj, bezonantaj germanan karbon, iras rekte al la germanaj karbminejoj, ĉar tiamaniere ili havigas al si provizojn de karbo por pli malaltaj prezoj ol postulataj por la "ripara" karbo.

Pro tio la belga registaro decidis limigi la liberecon en vendado de karbo, kun celo ĉesigi la superŝutadon el Germanio.

Ĝis nun Belgio rifuzis 90,000 tunojn de karbo kaj, laŭ plano de Dawes, ĝi devas pagi al Germanio po unu ora marko por ĉiu tuno rifuzita.

Oni komencis intertraktadon pri tiu temo kun Berlino.

Tradukis *J. Floro* (Londono).

Statistika bildo pri Hungario

(Ciferoj kiuj parolas)

Per ĉi statistikaj bildoj mi volas pruvi, ke la ofte aŭdita famo pri la mizera ekonomia stato de hungaria laboristaro ne estas troigita. Eĉ se oni funde rigardas la ĉi subajn ciferojn, tiam oni devos konstati, ke la vivo de hungara proletaro ĉiam pli kaj pli malboniĝas. Mi intencas doni per miaj statistikaj bildoj batalilojn en la manojn de kompetentuloj kaj montri al la tutmonda gekamaradaro, jen la sorto de tiuj, kies regantoj estas reakciuloj. Sed nun jam parolu mem la ciferoj: En la karbminejoj laboras el 55000 laboristoj nur 36000, en la ferindustrio el 50000 nur 33000, en la konstruindustrio el 22000 nur 3000, se oni pripensas, ke la senlaboruloj ricevas nenian helpon, tiam oni facile povos kompreni ankaŭ el ĉi ciferoj, kial grandiĝas ĉiam pli kaj pli la nombro de sinmortigantoj. Jen malgranda statistiko pri la sinmortigintoj el Budapest dum la ĉi subaj kvinjaroj:

En	1920	983	personoj
„	1921	941	„
„	1922	883	„
„	1923	936	„
„	1924	1060	„
„	1925 ĝis aŭgusto .	967	„
en tute	. . . . . .	5770	personoj

La kaŭzo de sinmortigo en 1925 dividiĝas jene, laŭ la opinio de gvidantoj de Budapesta Libervola Savasocio.

Pro	familiaj aferoj . . .	168	personoj
„	ekonomia mizero .	183	„
„	amtrompiĝo . . .	82	„
„	malsano	96	„
„	vivtedo	47	„
„	diversaj aferoj . .	491	„

La dividiĝo de sinmortigintoj laŭ seksoj.

Ĝis 1914 je	ĉiu 100	sinmortigintoj,	73	virinoj
„ 1919 „	„ 100	„	94	„
„ 1925 „	„ 100	„	112	„

La sorto de invalidoj estas la plej kortuŝa. Ekzemple 50 % vivforton perdinta invalido ricevas de la ŝtato pomonate 36000 paperkronojn, aŭ alivorte, je ĉiu dua tago nur tiom, kiom egalas je unu elspezo por tramveturo. Vidvino, kies edzo mortis en la milito, ricevas pomonate 24000 kronojn, kaj por ĉiu infano 6000 kronojn (aŭ je ĉiu tria tago pecon da bulko). La nombro de morto kaj morte naskitaj infanoj pliiĝis dum la lastaj jaroj laŭ la opinio de fakuloj je 20 %. Oni fabrikas pli da ĉerkoj ol lulilojn. La nombro de pulmmalsanuloj pliiĝis de 2,7 %—3 %. Dum la lasta jaro la pliiĝo estis 25 %. En 1920 je ĉiu 1000 personoj estis 13 geedziĝoj. En 1914 je ĉiu 1000 personoj naskiĝis vive 36 infanoj kaj nun nur 26, aŭ je unu triono malpli. La natura popolpliiĝo antaŭ la milito estis je ĉiu 1000 personoj 13 kaj nun apenaŭ 6 kaj de la ŝtatsaniga operacio de "Ligo de Nacioj" la natura popolpliiĝo malpliiĝis je 55 %.

La pan- kaj viand-konsumado en Budapest apenaŭ atingas la 25—30 % de la pactempa.

Do, por ke neniu povu diri, ke mi prisilentas la alian flankon, ĝuste tial mi pruvos, ke la kapitalistoj eĉ en ĉi malĝojigaj situacioj trovis siajn kalkulojn. Kiam la mizero de proletoj fakte estas por eksterlandanoj preskaŭ neimagebla, tiam la ĉi suba statistiko estas revoluciiga kaj ĝi pruvas tion, ke ĝis kiam ekzistas la kapitalista sociordo, ĝis tiam ĉiuokaze nur la proletoj malgajnas. La ĉi suba statistiko parolas pri tio, ke la aristokratoj, industribaronoj — kies entreprenoj fondiĝis kun la lasta duonjarcento — kiamaniere povis riĉigi siajn entreprenojn dum la lasta jardeko, en la jardeko de mondrenverso. Sed jam parolu mem la ciferoj: La "csetei Herzog"a bieno valori sen 1914 70—72 milionojn da kronoj, kio hodiaŭ multe superas la 72 milionojn da orkronoj. Grandega sumo ĝi estas, se ni pensas je tio, ke la tuta fundamenta kapitalo de la "Hungara Nacia Banko" estas nur 30 milionoj da orkronoj. Post la "tabakbaronoj" sekvu la "sukerbaronoj". La bieno de familio Hatvani Deutsch valoris en 1914 94 milionojn, kio eĉ nun ne malpliiĝis (kalkulite en orkronoj). La bienon de Schossberger oni taksis en 1914 je 10—12 milionoj da kronoj, kio hodiaŭ estas 35—36 milionoj da orkronoj. La "Volfner"a bieno hodiaŭ estas 35—40 milionoj da orkronoj, kio en la pactempo eĉ proksime ne estis tiom granda. La testamento de "Barono Weisz Manfred" parolas pri 40 milionoj da orkronoj, kio en 1914 estis nur 10 milionoj, kaj ĉi sumo kreskis ĝis 1918 je 100 milionoj. La bienon de "Torzegi" oni taksis en 1914 je 15 milionoj, kio hodiaŭ valoras 25 milionojn da orkronoj "Barono Bacher Emil" en 1914 estis nur simpla milionulo kaj sia bieno superas la 30 milionojn da orkronoj. La "Budai Goldberger Leo" antaŭ la milito ĉiam vivis en bienembarasoj, kaj sia bieno hodiaŭ superas 10 milionojn da orkronoj. Mi pensas, ke la ĉi supre cititaj ciferoj ankaŭ sufiĉas por pruvi, ke la grandkapitalistoj — sed nur ili — eĉ el ĉiu guto da sango kaj larmo, kion kaŭzis la mondmilito kaj la ĝin sekvinta renversita situacio, ili povis elpremi nur la belsonorajn orojn, dum la el sia pan-akira laboro vivantaj proletoj apenaŭ povis atingi nur 37 % de sia pactempa vivebleco. Ne parolante pri la senlaboruloj el kies vicoj devenas la plej granda parto de sinmortigintoj, de pulmmalsanuloj, de mortuloj. Kaj ni hungaraj proletoj devas ĉi staton toleri per kunmetitaj pugnoj.

A. S.

Respondu! K-doj Guma, Henriko (354), Paris; Revo, Lucien (1267), Drezen, Ernest (1518), ambaŭ en Moskvo kiel membroj de Interliga Komitato inter la LEA-asocioj kaj SAT bonvolu respondi al la letero de la provizora estro: k-do Max Scheithauer, *Wien* III Blattgasse 3/5.

En laborista klubejo

(Sovet-Unio, Smolensk)

La sesa postagmeze. Pordo de klubejo malfermiĝis kaj amaseto de laboristoj eniris ĝin. Pasis kvaronhoro kaj jam ĉiuj ĉambroj, ĉambregoj kaj ĉambretoj estas plenaj de centoj da gelaboristoj. Ĉiutage pli ol 2000 laboristoj vizitadas nian klubejon.

Ĉiu havas por si bonan ripozon. Nia klubo havas 21 diversajn rondetojn: politikan, muzikan, ŝakludan, literaturan, esperantan, gazetan, pentristan, artistan ktp. Por virinoj ekzistas kudrista kaj trikista rondetoj. Kaj eĉ radio-amatoroj preparis antenon, surtegmentigis ĝin kaj aŭskultadas koncertojn el Moskvo.

Klubanaro konsistas nur el laboristoj kaj ruĝarmeanoj. Nelaborista elemento ne ekdeziros eĉ eniri klubejon. Ĉiuj deflankiĝos de li, kun li neniu parolas kaj li mem ekrapidos foriri, kvankam lin neniu pelos.

Ni mem gardas ordon en la klubejo. Ebriulo ne estos en la klubejo pli ol unu minuton, ĉar laboristoj mem tuj forigos lin.

Nia klubeja membrokotizo estas tre malgranda: 10 kop. ĉiumonate kaj senlaboruloj membriĝas senpage.

Ni havas nian manĝejon, nian teatron. Ilin rajtas viziti ĉiuj, sed la klubanoj havas favoran enirpagon.

Mi diros simple. La klubejo donas al ni ĉion, kion ni deziras. Kaj ni neniam forgesas, ke ĉi-ĉion donis al ni komunista partio, gvidata de karulo Lenin.

Senpartia klubano.

Kiel hungaraj "SAT-anoj" timigis estonajn "neŭtralulojn"

Estonio, tiom malgranda kiom ĝi estas kun siaj malmultaj loĝantoj, penas ĉiamaniere konatiĝi al siaj parencpopoloj inter kiuj troviĝas ankaŭ hungaroj. Por tiu celo oni aranĝis "fratigan" ekskurson al Hungario. Inter la aliaj "fratigantoj" kunveturis ankaŭ iu "neŭtrala" esp-isto.

Reveturante Estonion li priskribis siajn "impresojn" en "Informoj de Esp-Asocio de Estonio" n-ro 44. La plejmulto de la artikolo estas dediĉita al SAT-anoj, kiuj lin, "neŭtralulon", penis ĉiamaniere embarasi kaj ĝeni dum la vojaĝado. Dum la veturo li unuan fojon renkontis esp-istojn en Vieno. Tie li vidis tri junulinojn, portantaj esp-insignon, li kompreneble tuj alkuris ilin kaj tre ekĝojis. Sed, ho ve! Kiel li seniluziiĝis! Parolante mallongan tempon kun ili, li eksciis, ke la esp-istinoj partoprenis *sennaciecan* (!) kongreson en Vieno. Laŭ lia, t. e. laŭ "neŭtralula" opinio tio estis "atendinda". Li vidis antaŭ si homojn, kiuj ne havas *naciecon (!)*. Por la "neŭtralulo" ĝis eterno estas malkompreneble, kial homoj ne volas esti nacianoj. Sed okazis preskaŭ katastrofo, kiam la "SAT-anoj" demandis, ĉu ankaŭ la "neŭtralulo" konsentas al la *sennaciuloj*. Li!? "Neŭtralulo"!? Ne!! Ne!! Dio gardu lin! Laŭ "neŭtralula" opinio homo havas nur tiam ian valoron, se li estas naciisto. Homo sennacieca estas nur senvalora sovaĝulo!

Tuj post tio la "neŭtralulo" demonstris sian kurkapablon kaj . . . forkuris de diablaj "SAT-anoj"!

Sed per tio ne jam finiĝis la embarasoj, ili reaperis en Budapest. Tie la "neŭtralulo" eksopiris, kiel li mem diris, je burĝaj esp-istoj. Por tio li ekserĉis la kunvenejon, sed ial, ĉu SAT-ano volis kun li ŝerci, li ekestis en laborista esp-societo. Tiutempe estis tie kunveno de la alkoholkontraŭuloj, kiuj tuj rapidis al li propagandi kontraŭ alkoholo, kiel li mem skribis en la "impresoj".

Sed li ne povis kompreni, kial ĝuste en Hungario estas tiaj societoj, kie la vino kaj alkoholo estas tiom dolĉaj kaj malmultekostaj. Ankaŭ tie oni tre ĝenis lin, cetere, eĉ komisiis al li alporti salutojn al la estona lab. esp-societo kaj al alkoholkontraŭuloj. Nu, kiel li kun tiu peza kaj granda "salutŝarĝo" povis reveturi Estonion? Ĉu li ne laciĝis survoje sub la peza ŝarĝo?

Tiu "neŭtralulo" ne estas la sola, kiu timas "SAT-anojn"; en Estonio, certe ankaŭ en la aliaj landoj, estas preskaŭ ĉiuj "neŭtraluloj" samspecaj. Se ili vidas, ke vi portas SAT-insignon t. e. verdan kvinpinton sur ruĝa fundo, ili tuj kuras al vi, demandas kio tio estas? Ĉu ne komunista? Aŭ ĉu vi estas SAT-ano? Fi! Aliĝu al UEA! ktp.

Kaj se ankoraŭfoje rememorigi la frazojn, kiujn la "neŭtralulo" diris en Vieno, ne estas malfacile imagi al si koncernan bildon, kia estas la tuta t. n. *"neŭtrala"* esp-istaro!

Do, "SAT-anoj" estu singardemaj kaj ne timigu "neŭtralajn" naciistojn!

Inferano. (2287)

La Hejmo de la Heroo

Post la milito Lloyd George kaj la aliaj politiktrompistoj en Britio promesis al la soldatoj "Landon taŭgan por Herooj". Jen la efektivigo de la promeso: En Glasgow 14 000 "Hejmoj" konsistas el nur unu ĉambro; 22 000 el nur du ĉambroj. Nur 38 procento el la familioj en London havas apartan domon. En Birmingham 90 686 homoj loĝas po 2 en unu ĉambro.

La procento de mortoj spegulas fidele la tro amasigon: en Bournville (modela urbo tre proksima al Birmingham) el ĉiu 1000 mortas ĉiujare 7,7 personoj; en Birmingham mem mortas ĉiujare 13,7 personoj.

Mensch und Maschine de E. Weckerle (Urania Verlag). Ĉu germana k-do scias tiun ĉi verkon. Temas pri traduko anglen por laborist-edukada literaturo. Ĉu inda?

DISKUTEJO

Io pri nutrado

K-do Fröding, skribante en S. n-o 7 (59) pri "malsanoj" ĉefe traktas nutradon. Vere, ke multaj malsanoj estiĝas pro neracie elektita nutraĵo, sed tiom malbona la afero tamen ne estas, kiom ĝin imagas k-do F. Li malaprobas amelriĉajn nutraĵojn, kiel terpomoj, blanka pano, rizo, fekulo ktp. kaj rekomendas uzi fruktojn kaj verdaĵojn freŝajn. Kompreneble, fruktoj kaj freŝaj verdaĵoj estas bonaj kaj por sano nepre necesaj nutraĵoj, sed nutri sin plejparte per ili, estas neeble. Ke homo estu sana kaj povu intense labori, por tio li devas uzi ĉefe tiajn nutraĵojn, kiuj donas al li sufiĉan kvanton da substancoj por renovigi la eluziĝintajn histojn de la korpo, kaj por produkti sufiĉe da varmo kaj energio por agadpovo. La kvanton de la varmo oni kalkulas por laboranta homo ĉirkaŭ 2500 kaloriojn tage, sed kiel tion akiri el la fruktoj aŭ verdaĵoj? Ekzemple, se oni volas ricevi tian kvanton el brasikoj, oni devas ilin manĝi 8 kilogramojn (300 kal. en kilogr.); se el pomoj, 5 klg. (500 kal. en klg.). Kiu povas sian stomakon ŝarĝi per tiom da manĝaĵo? Alia afero estas, se oni manĝas sekigitajn fruktojn, ĉar per ili oni ne bezonas kune enpreni ankaŭ multe da akvo. Sed sekigo ekstermas multajn necesajn substancojn. Oni devus por manĝaĵo uzi sufiĉe multe da fruktoj kaj verdaĵoj, sed por ricevi sufiĉan kvanton da energidonaj substancoj, oni tamen devas aldoni ne malmulte da amelaj nutraĵoj kaj graso, kiel butero aŭ vegetara graso. Kompreneble, nur uzante amelaĵojn, la sano ne povas resti bona, ĉar en ili mankas ja por organismo tre necesaj substancoj, troviĝantaj nur en fruktoj kaj verdaĵoj.

Ke malvarmumo aŭ iaj malsanoj estiĝas pro uzado de iaj nutraĵoj, tion mi ne kredas. Mi opinias, ke malvarmumo estigas iajn malsanojn, tio estas kaŭzita de tio, ke homoj sin tro multe ŝirmas kontraŭ efikoj de la vetero. Eĉ somere, kiam la vento estas varma, oni sin tre atente gardas, ke oni ne estu en trablovo, kaj tamen tiuj homoj malsaniĝas. Mi, kontraŭe, se estas por mi tro varma, mi serĉas tian lokon ĉe fenestro aŭ pordo, kie trablovas kaj mi sentas nur, ke tio min freŝigas, hardas. En komenciĝo de vintro mi ankaŭ preskaŭ ĉiam havas nazkataron, kaŭzitan de malvarmumo, sed tion verŝajne neniu povas eviti en okazo de tia grava ŝanĝiĝo de klimato kaj temperaturo. Kaj tamen mia manĝaĵo ne konsistas ĉefe el fruktoj kaj verdaĵoj, sed sekala kaj malofte blanka pano, kaĉoj kaj supoj el grioj kaj farunoj de diversaj grenoj, terpomoj, sukero, bovina kaj vegetaĵa butero, malofte lakto. Pli malofte legumenoj kaj legomoj.

Fine k-do F. malaprobas ankaŭ nutraĵojn, kiuj havas multe da proteinoj. Jes, ankaŭ ili estas malutilaj, se oni sin nutras nur per ili. Sed kial do uzi sole, ĉu nur amelriĉajn manĝaĵojn aŭ nur proteinriĉajn, sed ne ambaŭ mikse aŭ alterne? Ne ekzistas ja tiaj nutraĵoj, en kiuj ĉiuj substancoj estas proporcie laŭ bezono de la homa organismo.

Tallinnano.

SCIENCA KRONIKO

El la vivo kaj la scienco

Giganta gidro-elektro-stacio sur Dnepro

La ekonomia stato de Sovet-Unio pliboniĝas de tago al tago. Antaŭ nelonge, la tutmondaj imperialistoj, ĉirkaŭintaj Sovetion, estis konvinkitaj, ke neniam restariĝas ekonomiaj fortoj de Sovetio, sed dank' al streĉa laboro de laboristaro, la lando reviviĝas kaj per rapidaj paŝoj.

Unu el plej gravaj aferoj de registaro estas elektrifikado. Komence, kiam fortoj estis malgrandaj, plejparte estis konstruataj malgrandaj elektro-stacioj por vilaĝoj kaj urbetoj, sed unu, kiam la uzado de elektro pligrandiĝis (reviviĝinta industrio bezonos nun malkarajn kaj grandegajn elektrofortojn) — oni komencis serĉi, tiel nomatan blankan karbon (plej malmultekosta energio). Unue, estas konstruata gidroelektro-stacio ĉe Volĥov (apud Leningrad), dononta baldaŭ energion en urbon por lumigado, uzinoj, fabrikoj ktp. Due, grandaj stacioj: Ŝatura, turkestana k. c. kaj finfine oni projektas novan grandegan stacion sur Dnepro (apud Ekaterinoslav). Profesoro Aleksandrov donas jenan projekton: Malsupre ĉe kolonio Kiĉkas estas konstruita granda digo, levigonta akvon je 37 metroj. La digo estas farita el ŝtonoj. Sur dekstra bordo de Dnepro troviĝos la stacio mem je 300 000 H. P. (ĉeval-fortoj). La akvo eniros tra apartaj tuboj (diametro 6 metr.) kaj turnos la turbinojn. Entute estas 6 turbinoj, ĉiu po 50 000 H. P. Kun turbinoj sur unu akso turniĝos elektrogeneratoroj, ĉiu po 35 000 kilovat. La elektroenergio je 11 000 volt. trairos transformatorojn, kiuj pliigas fortecon ĝis 110 000 volt. Entute, la stacio donos ĉiujare 1 200 000 000 kilovat-horojn. La energion uzos la fabrikoj kaj uzinoj de Ekaterinoslav, Saporoĵje, Nikopol, Krivoj-Rog kaj eĉ Ĥarkov. La kilovathoro kostos (en Ĥarkov) ne pli ol 1,23 kop. t. e. trifoje malkare ol nun.

Krom la elektro-energio, la digo donos eblecon al vaporŝipoj veturi de Ĥerson ĝis Ekaterinoslav kaj pli supre, ĝis Kiev, ĉar la akvo leviĝos kaj profundeco estos ĝis 5,34 metr. Apud stacio, ĉe maldekstra bordo de Dnepro estos konstruitaj kluzoj, kies larĝeco estas 17 metr.

Sed dank' al granda leviĝo de akvo, proksim-troviĝantaj vilaĝoj subakviĝos. Soveta registaro jam klopodas, por ke vilaĝanoj de subakvigitaj vilaĝoj, ricevu teron en aliaj lokoj.

La konstruado daŭros 6 jarojn kaj kostos 130 milionojn da rubloj. Estas okupataj ĉe laboro pli ol 15000 laboristoj.

Oni projektas ankaŭ novan fervojon Demurino-Zaporoĵje-Marganee.

Kiam la stacio komencos labori, estos eble fabrikadi aluminon, kiu kostos pli malkare, ol aĉetata nun en eksterlando.

La laboro komenciĝos en 1926. Nun estis kaj estas farataj prepar-laboroj por esplorado de grundo, mezurado ktp.

Kiam la stacio ekfunkcios, oni projektas pligrandiĝon ĝis 650 000 H. P. kaj pliprofundigon de Dnepro, por ke grandaj marŝipoj povu veturi el Nigra Maro al Zaporaĵje, kie troviĝos granda haveno, elevatoroj — grenejoj, diversaj deponejoj kaj ripar-metiejoj. Speciala komisio, sub prezidado de k-do L. Trocki jam komencis esploradi la projekton. Kiam la stacio ekfunkcios, soveta sudmetalurgio ricevos novan grandegan fonton de energio, en kiu ĝi jam havas bezonon.

I. Avrunin, Kremenĉug (1122)

La internacia lingvo

II.

La rolo de la homa volo en la historia proceso

Karl Marks instruis al ni, ke la ampleksiĝo de l' kapitalismo kreas unu klason, la proletaron, kies historia misio estas jena: neniigi la burĝaron kiel ekspluatantan klason. Sed por ebligi al proletaro la plenumon de tiu tasko, necesas ke la laboristoj organiziĝu super la landlimoj; necesas ke ili konsciu pri sia klasunueco, kaj ke ili disiĝu de siaj naciaj pra- kaj mis-juĝoj. Ankaŭ necesas, ke iliaj gvidantoj havu netan bildon de la celo atingenda.

La veraj revoluciuloj ne similas al tiuj fatalistoj, kiuj atendas senage ĝis la kapitalismo falos sub la pezo de siaj krimoj.

La harmoniaj voloj de la malplimultoj penantaj laŭ la senco de la historia evoluo plirapidigas ĉi evoluon, ĉar ja ili liveras solvojn adekvataj je la konkretaj problemoj, kiuj ĉiutage naskiĝas. Jam la juĝkapabla parto el laborklaso streĉas sian volon al kreo de institucioj adaptigeblaj je la novaj kondiĉoj ekonomiaj. Kaj kunfaskigi ĉiujn fortojn de ti-kiuj komprenis la neceson detrui la kapitalistan reĝimon, jen kia devas esti la komuna tasko de la diversaj labororganizaĵoj internaciaj.

Sur ĉiuj kampoj, la volo de l' homo tiras la ordon el la kaoso. Kaj jen, nun ni estas en plena kaoso lingva. Nun la sur la tero parolataj lingvoj nombriĝas almenaŭ 800, ne kalkulante la dialektajn variaĵojn. Ĉiuj agitemaj laboristoj spertis pli-malpli la baron, kiu disigas ilin de iliaj klasfratoj, ĝi estas: la lingva diverseco. La perado de la tradukistoj kaj interpretistoj estas nur meztaŭga rimedo, kiu ne solvas la problemon. Tagon post tago pliakutiĝas la neceseco de lingvo komuna inter ĉiuj proletoj. Abundas la pruvoj por pravigi tiun aserton. Mi citos nur la jenan, tiritan el "*Bulteno de la Internacia Federacio de la Transportlaboristoj* (n-o 10, okt. 1924): "Ni ne malatentu la grandegan elspezon de energio, tempo

kaj mono kiun postulas, jam nun, la funkciado de nia sekretariejo. Nia informbulteno aperas en franca, germana, angla, hispana lingvoj, kaj baldaŭ reaperos la sveda eldono. Niaj gazet-komunikoj aperas en franca, germana, angla kaj sveda; ĉiuj presaĵoj niaj estas publikigataj almenaŭ en tri lingvoj, iafoje en kvar, kvin aŭ ses. La sekretariejo korespondas (krom per esperanto) per franca, germana, angla, sveda, itala, hispana kaj holanda — — —. Ĉe kunsidoj de niaj direktorganoj, la paroladoj estas tradukitaj en francan, germanan, anglan, hispanan kaj italan; plie ĉe niaj kongresoj, en svedan.

Ĉu vi perceptas la signifon de ĉi-ĉio? Kaj ĉu vi pensis, ke nenia tradukaĵo, kiagrade ajn estis la sperto de la tradukinto, respegulas plene la emfazon kaj la konvinkopovon de la originala parolado? Kaj jen pliaj difektoj de la procedo: tradukaĵo neekzakta, resumo tro konciza, miskomprenoj multaj, ĉio kio povas okazi kiam interpretisto devas transmisii al la aŭdantaro la penson de la oratoro per lingvo, kiun tiu-ĉi ne posedas. Jen la embarasoj en kiuj ni baraktas nun, kaj kiuj, nedubeble ankoraŭ pliakriĝos. *Por niaj laboroj estus konsiderinda avantaĝo, por la tuta laborklaso estus unuagrada utilo, se ebliĝus krei reciprokan kontakton, parolan kaj skriban, per unu sola lingvo.*

Nun, ni montros, ke por forigi tiun baron sufiĉus aganta volo de la internaciaj labororganizaĵoj. Sufiĉus decido analoga al tiu de la *Internacia Kongreso de la Elektristoj* kiu, en 1881, adoptis la tiel nomatan C. G. S. sistemon de fundamentaj unuoj, aŭ analoga al tiu de la *Internacia Kongreso de Kemio* kiu, en 1889 adoptis nomenklatur-sistemon por la organika Kemio.

Ni jam montris, ke la historia proceso kondukas al lingva unueco tutmonda. Kiu kutime rezonas laŭ la marksista dialektiko, tiu senpere agnoskas tiun nepraĵon. Tamen iuj kamaradoj emas kredi, ke tio naskiĝos el ia movado blinda en la evoluo de la lingvoj. Kiel utopion ili konsideras la entreprenon por arte krei lingvon venigita je la gramatikaj stultaĵoj, kiuj pli-malpli svarmas en ĉiuj lingvoj "naturaj".

Tiu opinio verŝajne formiĝis el jena eraro, ankoraŭ nun tre fama, rilatanta al la naturo mem de la lingvo. Ja, longtempe oni konsideris la lingvojn kiel vivantajn organizaĵojn[1]). Sekve, voli arte krei lingvon estas kimero. Tiaspeca kreo ne havus pli da vivkapablo ol la "Homunculus" de Faŭsto.

Sed la lingvistiko jam pruvis la eraron de tiu opinio. "Lingvo estas tradicia verkaĵo socia. Senĉese la volo de l'homo influon lasas en la lingvo. Ke uziĝas komuna idiomo, kia la franca, angla aŭ germana, tio devenas el prudentaj agoj. Lingvo, kia la norveglanda, estis farita, baze sur la norvegaj dialektoj, el elementoj arbitre elektitaj, kaj ĝi reprezentas neniun dialekton difinitan. Do, neniel sensenca nek ekscesa estas la pretendo tiri el la eŭropaj lingvoj la komunan elementon kiun ili enportas, por el ĝi fari internacian lingvon"[2]).

Antaŭ ol paŝi pluen en nian skizon, ni petas la leganton noti zorge la sekvajn punktojn kiuj, niaopinie, estas jam demonstritaj: 1. La movado por adopto de unu lingvo internacia disvolviĝas laŭ la senco de la historia proceso, 2. lingvo estas verkaĵo en kio rolon havas la volo de l'homo, 3. estas neniel malracia pensi pri starigo de internacia lingvo, trudata per decido de la labororganizaĵoj, kiuj sentas ties utilon.

Nun ni montru, ke ekzistas unu lingvo internacia, kies, lernadon kapablas ĉiuj laboristoj kaj kiu, plie, estas jam tre uzata en tutmondo.

(Daŭrigota) Tradukis el la franca *L. B.*

[1]) "Lingvo estas vivantaĵo, treege kompleksa, kies organoj rezultiĝas el multego de historiaj kaŭzoj . . . Voli krei lingvon, tio estas tiel kimera kiel fabriki planton aŭ animalon". (A. Dauzat: *Le français et l'anglais, langues internationales. [La franca kaj la angla, lingvoj internaciaj], paĝo 17).* — En tiu pamfleto, dummilite eldonita, la aŭtoro, krom la ĉi-supra stultaĵo, aldonas tion, ke esperanto estas germana verkaĵo utiligata kontraŭ Ententolandoj.

[2]) A. Meillet: *Les langues dans l'Eŭrope Nouvelle (La lingvoj en la nova Eŭropo) pĝ. 321.*

Paŝo post paŝo . . .

Lastatempe la laborist-esperanto movado SAT-eca en Nederlando vigle kreskas. Kaj en la pasinta semajno (24. XI. ĉ. j.) ni triumfis nian unuan venkon, nian unuan grandvaloran atingitaĵon ĉe la aktiva ono de la laboristaro. Nome, kiel la rezultato de la klopodado de nun el niaj kamaradoj, la menciitan daton en la ĉiutage aperanta ĉeforgano de l' holanda kom. partio aperis unuafoje la rubriko "Laboristvoĉoj el ĉiuj mondpartoj" (holandlingve kompreneble). Depost nun la redakcio de la gazeto "De Tribune" disponas al ni ĉi-rubrikon, — en grandeco de ĉirkaŭ 3/4 pĝ. de "Sennaciulo", — por aperigi en ĝi artikolojn, informojn ktp. pri ĉio, koncernanta movadon laboristan, kaj ricevitaj el aliaj landoj *per Esperanto.* La enkonduka artikolo parolas iom pri proletesperanta movado, SAT, kaj la celoj de la rubriko. Kaj ĝis nun estas aperinta jam kelke da artikoloj de alilandaj kamaradoj.

Sendube tio estas grava paŝo antaŭen sur la vojo de apliko de Esperanto en la movado laborista. Kaj se ni sukcesos bone plenumi nian taskon kaj tion ni *devas!,* — zorgi ke la rubriko enhavu interesajn kaj seriozajn aktualaĵojn laboristajn el kiom eble plej granda nombro da landoj por verigi la rubriknomon ". . . el ĉiuj mondpartoj". Nia movado havas efikan propagandilon, uzebla ĉe alilandaj lab.-gazetoj kaj estos instigilo de SAT-anoj por penegi *ĉie* atingi la samon, t. e. la konstantan rubrikon en lokaj lab.-gazetoj.

Tial, gekamaradoj, ni bezonas seriozan kunlaboron de multaj el vi! Ĉiu, kiu povas kaj kapablas, sendu al ni artikolo(j)n ĉu longajn aŭ mallongajn pri, ekz., salajroj kaj vivkostoj, senlaboreco kaj batalado kontraŭ ĝi, situacio de diversaj industribranĉoj, de agrikulturo, agrikulturaj laboristoj, historio de via fabriko kiam kaj kial nome *tie* konstruita, ĉu pro necesaj krudaĵoj, facile riceveblaj, aŭ malmultekosta laborforto ktp., socia asekuro, longeco de labortago, profesia movado, strikoj, lokaŭtoj, loĝejmizero, gravaj lab.-kunvenoj, -kongresoj, politika situacio, lab.-sporto, komjunulara kaj pionira movadoj, proletaj kulturorganizaĵoj, diversspecaj lab.-kooperacia movado ktp. ktp. ktp. en via lando aŭ distrikto. La vico el la komunikindaĵoj estas ja senfina, sed ĉiu elektu laŭ sia volo kaj bontrovo. Precipe ni nin turnas al gekamaradoj en Sovet-Unio, Azio, Afriko, Indonezio kaj kolonioj.

Al vi ni rekompencos kun la samo pri Nederlando kaj ĉiuj kunlaboranto ricevas la n-on de "De Tribune", en kiu aperis lia artikolo.

Al la laboro, kamaradoj! Rezultathava *per-Esperanto,* jen la plej efika *por-Esperanto.* Kaj jam komencas trapenetri laboristaron la kompreno pri la utileco de internacia lingvo Esperanto, en la laborista movado tutmonda. Ni martelu! Senĉese!!

N. Karotam, Aalsmeer (5356)

Ĉiun kunlaboraĵon oni adresu al k-do M. Harmsen, Stommeerweg, *Aalsmeer,* Nederlando.

KRONIKO

Ĉekoslovakio

Gablonz a. N. La ĉi-tiea laborista Esperanto-grupo aranĝis la 21. kaj 22. nov. Esp-ekspozicion. Vizitis ĝin multaj gelaboristoj. Ni estas tre kontentigitaj. Ni tute sukcesis. Krom multaj gazetoj, libroj kaj broŝuroj diverstendencaj ni ekspozis multan propagandmaterialon, surskribojn, landkartojn, statistikojn ktp. kaj ni tiamaniere instigis la plej indiferentulojn interesiĝi por Esp. Ni aranĝis la ekspozicion kvazaŭ de klasbatala vidpunkto kaj per tio ni sukcesis ĉe la partio (la kompartio ĉe ni estas plej grava) kion montras la raporto de "Vorwärts", kiu sendis specialan raportanton.

Plzeň. Laborista Ligo Esperantista en Ĉekoslovakio aranĝos la 13. dec. je la 9. antaŭtagmeze en laborista domo "Peklo" en Plzen kunvenon de okcidentbohema regiono. La kunvenon partoprenos ĉiuj grupoj kaj societoj esp. kaj ĉiuj gesamideanoj de regiono. Sabate 12., antaŭ kunveno okazos la vespero kun bela esperanta programo je la 7. horo vespere.

La gek-doj, kiuj intencas viziti la vesperon sciigu, ĉu ili deziras loĝejon por pasigi la nokton.

Proponojn al kunveno oni sendu al "Laborista Ligo Esp." en Plzen (Ĉekoslovakio).

Laborista Societo Esperantista Plzen I. aranĝas 2 kursojn por komencantoj (40 lernantoj). Ĵus estis malfermita nova ejo, kiu estis kun granda elspezo restaŭrita kaj ornamita. Regulaj kunvenoj okazas ĉiam merkrede de la 6.—9. horo vespere. La klubejo troviĝas en Laborista Domo "Peklo".

SAT-ano 5195.

Francio

Le Teil (Ardeche). La 22. 11. 25 okazis kunveno de "Rodana Grupo", eperantista asocieto regiona, kies celo estas konigi Esperanton kaj montri, ke ĝi estas nekomparebla ilo por la liberiĝo de la laboristaro tutmonda. La ĉeestintoj ĝojis aŭdi la sekretarion k-don Meycelle, kiu faris en Esp-o interesegan kaj esperigantan raporton pri la kreskado de "Rodana Grupo" kaj pri la sukceso de nia propagando ĉe la fabrikaŭ kamplaboristoj. Tio permesas esperi bonan rikolton por SAT.

SAT-ano 5193.

Nederlando

Amsterdam. En nia urbo estas malfermita la Domela Nieuwenhuis-museo (adr. Alb. Thijmstr. 7) por memorigo al ĉi tiu granda antaŭbatalando de la socialismo en Nederlando. Ĝi enhavas la grandegan bibliotekon de la mortinto, ĉambron aranĝitan kiel la laborĉambro de Nieuwenhuis kaj multan alian rilatantan al liaj vivo kaj laboro. Por utiligi la postlasitaĵon al la laboristoj, la libroj el la biblioteko estas prunte riceveblaj.

Laŭ el Semarang ricevita telegramo la hindiaj komunistoj Darsono, Ali-Archan kaj Mardsjono estas internigitaj. Materialo, i. a. la adresoj de la abonantoj de la hindia kom. taggazeto "API" estis konfiskata.

Sovet-Unio

Blagoveŝĉensk sur Amur (Orienta Siberio). La 28. aŭg. okazis ĝenerala kunveno de SAT-anoj. Laŭ propono de unu k-do oni organizis SAT-grupon. Kiel sekr. estis elektita k-do A. Borisoglebski. La varbado por SAT kaj SEU pasas tre sukcese. Je la oktobro estis nur 6 SAT-anoj, sed nun jam 16. Inter varbitaj estas kamparanoj kaj instruistoj el la vilaĝoj.

La lernantoj de eksperimente-modela lernejo ĉe Pedagogia Teknikumo sukcese korespondas kun unu lernejo el Nov-Zelando, ricevante de tie ne nur interesajn leterojn, sed ankaŭ belajn geografiajn kaj natursciencajn vidaĵojn. Pri ĉi tiu korespondado kelkfoje skribis lokaj gazetoj. La "Juna gvardio" eĉ enpresis longan art. sub titolo "Kian utilon povas alporti lingvo esperanto por internacia korespondado de junaj pioniroj."

La 2. nov. en la loka malliberejo organiziĝis 2. grupo por studado de Esperanto. Aliĝis 108 malliberigitaj k-doj. Gvidas k-do Sostavkin. La 1. nov. aperis 3. numero de murgazeto "Ruĝa Esperantisto", pri kiu loka gazeto "Amura Vero" enpresis tre bonan recenzon. La 2. nov. okazis tuturba kunveno de esperantistoj. Aktivaj k-doj faris raportojn pri V. kongreso de SAT kaj pri II. kongreso de SEU. Interalie, la kunveno decidis, ke je la fino de nov. funkciu kursoj de esp-o por laboristoj kaj oficistoj.

La 5. nov. malfermiĝis kursoj de esp-o en 1. sepjara lernejo. Vizitas ĝin 25 gelernantoj. Gvidas 15jara juna pioniro, parolante en esp-o, k-do Gromov.

Loka gazetaro tre favore rilatas al nia movado. Oficiala gazeto "Amura Vero" unufoje dum du semajnoj akurate havas longan "esp. anguleton".

Vilaĝo Aleksandrovka, Amursk. gub. (Siberio). En la loka sepjara lernejo en 5. klaso estas enkondukita lingvo Esperanto. La lernantoj treege interesiĝas pri la lingvo kaj soifas starigi korespondadon kun alilandaj gelernantoj. Instruas k-do Ignatenko.

A. Borisoglebskij, SAT-ano 4789.

Ĥarkov. Estas tradukita ukrainlingven kaj en proksima tempo aperonta ĉe la *Ŝtata Eldonejo Ukrainia* la fama broŝuro de k-do E. Lanty: "La Lingvo Internacia".

Kremenĉug. Okazis prelegoj de k-do Izgur pri Esp-o ĉe la Industri-komerca lernejo kaj en la klubo de oficistoj "Uricki". — Ambaŭloke fondiĝis esp. studrondoj: en Ind. Kom. Lernejo 40 stud. (gvid. k-do Izgur). En klubo "Uricki" 25 stud. (gvid. k-do Frejdberg). Instruado farita kun la helpo de "Petro".

Globino (Kremenĉug distr.). Ĉe la "Vilaĝan-Hejmo" ekfunkciis esp. rondeto el kom. junuloj (12 k-doj), gvidata de k-do Capir.

Dankojn

K-dinoj Rauber, Boubou, Ivanova Beiermann kaj Boxhammer responde al mia peto en "Senn." sendis presindajn leterojn. Ŝufiĉas la materialo ĝis mezo de jan. 1926. Volonte mi sendos ekz. de "Labour Woman" al iu k-dino, kiu promesos helpi. (M. S. 25 New. St. London S. W. I.)

Je kies nomo? —

Malkonfido — Boparenca al la homaro, aparte malkonfido al novaĵoj. Malkonfido kaŭzas kritikon, kritiko — reformemon kaj reformagado ofte donas nenion valoran. Ĉi — "antitezo" preskaŭ Hegela "triado" — estingis multajn fajretojn, ekbruligitajn por lumigi La Vojon al La Tuthomara Feliĉo, de multaj konataj kaj rekonataj uloj el la grupo — homamikoj.

Ni nur transfoliumu t. n. "Historio de l' Hommalsaĝeco" por trovi la multenombrajn ekzemplojn de ĉi-mortkaŭzantaj faktoj, kies viktimoj falis ofte — gloraj noblacelaj produktaĵoj de la saĝo, homaramikoj ankaŭ ili mem.

Kiel karakteran fakton ni notu, ke la kritikuloj kaj reformuloj elmovante "sintezon" kaj "antitezon" kontraŭ suprenomitajn "fajrerojn en la abismo" ĉiam ŝirmis sian agadon per la plej neprofitema servado al la beno de tuthomaro. Jen! —

Iu frenezulo (Galilej — lin oni nomis). Je lia herezeco senfina pruvas, ke la tero estas globforma, per ĉi-elpensaĵo li malfirmigas la bazon de la Sankta Eklezio, kiu saman problemon tute alimaniere decidas. Ĉu li ne estas krimulo? — Jes, li — krimulo. Do, ekrostu lin por li forĵetis kapon ĉi-herezaĵo! — Kaj oni ekrostis fonditon de la plej granda teorio *je nomo de la Sankta Eklezio.* —

— "Ne plu militu, ne plu verŝu fratsangon" — instruadis Homaron Ĵores kaj multaj aliaj el la homamikoj — "ŝparu fortojn por la alia batalo, batalo por via liberigo!" — Sed aliaj "amikoj" — Sama Homaro parolis: — "Beno de l' patrujo — via beno." Antaŭen al glorvenko! Batu provokistojn! — Kaj oni batis, eĉ mortbatis la plej glorindajn el la Homoj — *je nomo de la sankta patrujo.*

Iu amerika scienculo kuraĝiĝis publike aplaŭdi Darvin teorion pri "Deveno de l' vidaĵoj". Oni kondamnis lin (ĉar li prapatrigis juĝistojn simion) *je nomo de la sankta libro (biblio).*

Vipbatojn, pendigilojn, malliberejojn — malavare oni donacas kontraŭ ĉiuspecaj novaĵoj — projektoj de la sociordo, same je iu nomo *"je nomo de la sankta kapitalo.*

Ĉiam je nomo de iu ajn "sanktaĵo"! . . .

Nun ni rigardu iom alidirekten. — Jen! —

SAT-popoleto, modela, imitinda societo, feliĉa kuniĝo, fruktodona laboro, ĉar ĉi homorganizaĵo tute "ne forŝirita per la internaj kontraŭdiroj" — nu unuvorte tre vivema, do enviinda sociaĵeto! . . . Sed ĉu neniom malsanas ĉi-juna multesperdonanta etulo-societo! — ĉu ne necesas kuracisto? — Jes, bedaŭrinde, jes! — ni iom malsanas, epidemie malsanas kaj nomo de nia malsano — troa reformemo de kelkiuj.

Same kiel ĉiuj ĉi-superaj ekzemploj nia — posedas sanktaĵon *"je nomo de la . . .* sankta — forflugas lango — *unuecfrontagado al la Internacio! . . .*

Mi ja tute ne estas konservatulo por kontraŭdiri tutmondskalon de nia movado, sed bilancante kondiĉojn mi parolas: Karaj amikoj! — Ne babilaĉu tro, laboru, laboru, laboru kaj almenaŭ dume reorganizigcelantaj revoj forĵetu kapon por beno kaj *je nomo de nia bravega SAT! . . .*

Dm. Albanov (1188)

SUPLEMENTA PAĜO AL "SENNACIULO"
N-o 5 — 17. DEC. 1925

LA LERNANTO

Tian homsvarmadon mi dezirus vidi; sur libera plac' liber-popolon gvidi

Pri malbona kaj bona dio

Antaŭa sovaĝula homo, ankaŭ kiel nunaj sovaĝuloj, entute dependis de naturo, kiu somere por ili estis afabla, sed vintre malafabla kaj kruela. Somere sovaĝuloj estis sataj kaj estis varme al ili, sed vintre ili malsatis kaj suferis pro malvarmo. Somero donis al ili feliĉon, sed vintro — malfeliĉon. Krom tio mallumo ilin tre timigis, ĉar en mallumo ili ne povis vidi, sed ĉiuj timigaj bestoj atakis ilin nokte. Tial de la plej malproksima tempo homo honoris pli ofte sunon, ĉar ĝi ilin varmigis, kaj per lumo sia forpelis timigan mallumon. Sovaĝulaj homoj ne komprenante fortojn naturajn, opiniis, ke mallumo estas timiga dio. Samo, kiu forpelis mallumon kaj malbonajn spiritojn de mallumo, t. e. timigajn bestojn, estis respektata kiel bona dio. Malkleraj homoj ankoraŭ ĝis nun kredas, ke ĝis noktmezo sur tero vagas diabloj, sed kiam ekkantos koko, t. e. kiam nur estas proksime mateno, ĉiuj diabloj forflugas en inferon. Sed koko krias antaŭ sunleviĝo, t. e. proklamas pri alveno de bona dio. Kaj nia vilaĝana antaŭjuĝo, pri tio, ke kiam kantas kokoj — disflugas diabloj, havas interligon kun tre antikva kredo de homoj je bona dio — suno, forpelanta malbonajn spiritojn de nokto. Trad. el rusa *Trofimov*.

Kiu pagis por la luo de la fiakro?

Estis varmega tago. La vojo estis dezerta. Viro marŝis malrapide.

Li estis laca kaj soifa, sed magia pakaĵo sekure metita en lia interna poŝo kontraŭis la varmegon, la soifon kaj la lacigon de la vojo. Lia poŝlibro enhavis 200 sterlingajn funtojn en biletoj. Li ĵus eltiris sian ŝparaĵon el la apuda poŝtoficejo.

Je la transiro de la flankvojo aliris lin sinjoro.

Li estis sinjoro en ĉiu rilato. Lia haŭto estis klara kaj atestis pri ĉiutaga bano. Lia vestaĵo estis laŭfasona, lia korpo bone nutrita, kaj lia marŝmaniero libera kaj trankvila, lia akcento eldiris sian superon socian.

La sinjoro, ĝiskora demokrato deziris al la viro "bonan matenon" kaj marŝis apud li.

Ili parolis pri la varmo, la polvo kaj la temoj de la tago.

La sinjoro diris al la viro "Vi ŝajnas laca, kunulo; flaru tiun botelon — ĝi fortigos vin."

La viro metis sian nazon al la botelo. Unu aŭ du minutojn poste li sentis siajn krurojn ŝanceliĝi sub si, kaj falis peze.

Li estis svenigita.

La sinjoro tiam esploris la poŝojn de la viro zorge kaj sisteme. Li prenis lian ŝparaĵon for de li, sed lasis al li moneretojn.

Kaj malkaran horloĝon.

Baldaŭ fiakro alvenis al la loko.

La sinjoro alvokis la veturigiston kaj persone akompanis la malriĉulon al la hospitalo.

Vespere la viro vekiĝis.

La doktoro, flegistino kaj pordisto certigis lin, pri la bonkoreco de la sinjoro. La sinjoro kondukis lin persone al la hospitalo, mem pagis la takson al la fiakristo kaj faris donacon al la hospitalo.

La veturigisto, poste, konfirmis la diraĵon de la hospital-stabo.

"Vera sinjoro" li diris "pagis al mi plenan pagon kaj trinkmonon el lia propra poŝo."

— — — — — — — —

La kapitalisto enpoŝigas "neperlaboran enspezon" senruĝiĝe kaj fanfaronas pri la impostoj, kiujn li pagas.

Trad. el angla *3398*.

Mi amas vin . . .

Mi amas vin, ho mia belulino,
Pro via kara vizaĝet',
Mi amas vin, ho mia fianĉino,
Pro ĉiu via ploreret'.

Mi amas vin pro viaj okuletoj,
Dum nokto, kiel stel' brilantaj,
Mi amas vin pro viaj du lipetoj,
Varmege tiel min kisantaj.

Mi amas vin pro via bela kolo
Kaj pro labor' malmolaj du manetoj,
Kaj estas leĝo ĉiu via volo
Al mi kaj ĉiuj viaj deziretoj.

Esperante verkita de Skribemulo.

Ekkonu la danĝeron!

Tagmeza paŭzo: La maŝinbruo eksilentiĝas, laboriloj estas formetataj. Al ioma ripozo, se ankaŭ nur duonhora, sopiras la gelaboristoj. Sed ankaŭ la stomako bonvenigas la paŭzon.

Vaste malfermitaj fenestroj enlasas la varmajn sunradiojn kaj freŝan aeron. Maĉante la proletoj sidas apud la fenestroj.

Subite muziksonoj. En la korto estas vaganta muzikanto, akompanata de du infanoj inaj. Sur iliaj vangoj respeguliĝas la malsato; la palaj, sulkaj vizaĝoj atestas mizeron, la ĉifonaj vestaĵoj admonas al kompato. Kantante la mizerulo penas logi el sia akordiono kortuŝajn melodiojn. Li ludas konatajn popolkantojn, unu, du, tri. La moneroj falas malsupren. —

"Dankon, koregan dankon! Dio rekompencu vin," balbutis la muzikisto. Kaj klinante la kapon dorsen, li poste, kvazaŭ en ekstazo, supren diris: "Nun je fino venos la plej, plej bela!"

Longtiratataj tonoj ŝvebis aeren, iom post iom formiĝante al tuto.

Kio estas? La himno germana? — Jes, nun bone aŭdebla: G-e-r-m-a-n-io s-u-p-e-r ĉ-i-o . . . . . .

En la kvara etaĝo laboristo koleras, furioziĝas. Prenante tason da akvo li verŝas ĝin sur la fimuzikanton. Dum la falo la akvo disŝprucas kaj trafas bone la malindulon.

Ĉesis la muziko. La antaŭe nur balbutpovanta almozpetulo subite kriis, kriegis indigne.

"Fripono vi! Vi ne indas nomi 'germano!' Ja, vi certe ne estas germano, vi estas ĉeko aŭ tia malbenita ruso. Bestaĉo vi, mi venas supren kaj traponardos vian bruston!"

— Kiel respondon li ricevis duan akvodushon kaj la admonon tuj malaperi.

"Iru al via, 'Germanio super ĉio' petu vian heroigitan kapitalistan ŝtaton pro subvencio. Pripensu vian sorton kaj konsciu, kiu kulpas ĝin!"

Pugnominacante la muzikanto foriris.

— — — — — — — — —

La moralo de ĉi travivaĵo? Laboristoj, ekspluatataj mizeruloj, konsciiĝu ĉiuokaze, ke ni per ĉiuj niaj fortoj, per ĉiuj rimedoj forigu la naciismon. Ni igu pensi la masojn. Pli profunde ni martelu en la kapojn, ke estas sensencaĵo, ja eĉ krimo, denove militi por "sankta patrio". Per paroloj, gazetoj kaj filmoj ni montru la "fruktojn" de l' pasinta hombuĉado mondmilita. Ĉu la sango de l' viktimoj ne krias al ĉielo? Ĉu vidvinoj kaj georfoj, kaŭzataj per milito, plimultnombriĝu?

— Novaj militoj prepariĝas. Gefratoj, ekkonu la danĝeron! Agu, kunhelpu forigi la naciismon kaj per tio eviti militojn. Eluzu ĉiujn batalmetodojn, ankaŭ etaj rimedoj kondukas al celo. Kaj kiam laboristaro ĝuste scipovas uzi sian forton, tiam ni ankaŭ venkos. Vivu sennaciismo!

f-Leipzig.

For la mallumon!

Du viroj staris ĉe karbminejo. La kaĝo veturis supren kaj malsupren kaj la karbĉaroj disŝutas la karbon en ŝarĝvagonojn.

"Rigardu", diris unu el la viroj, "la grandajn blokojn. Kiel la malgrandaj karbministoj povas manlevi ilin?"

"Ho, tute facile," respondis la alia. "Ili laboras en duonlumeco nur havante malhelajn lampojn. Tial ili ne povas vidi kion ili levas!"

— Ĉu la laboristoj iam konscias pri la blokoj de rento kaj profito.

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)